THE BRITISH ESPERANTIST

with which is incorporated "International Language"

55th Year, No. 646 PRICE - ONE SHILLING or Ten Shillings per year, post free May, 1959

ĴUS APERIS!

MI VOLIS VIZITI LERNEJON

Interesa rakonto pri la vivo de ĉina malriĉa kamparana knabo antaŭ la liberiĝo en 76 vivecaj bildoj kun kolora kovrilo kaj lakonaj klarigoj.

Eldonis Ĉina Esperanto-Ligo

Prezo: 1 ŝil., plus afranko 4p.

Mendu ĉe Brita Esperantista Asocio

EL POPOLA ĈINIO

Esperanta kultura gazeto riĉe ilustrita kun kolora kovrilo informas vin

pri ĉinaj kulturo, arto kaj literaturo,
pri la vivo kaj moroj de la ĉina popolo,
pri ĝia historio k.a. fundamentaj scioj koncerne la landon.

Ĝi aperas dumonate en kajero 36-paĝa plus kovrilo, 19 × 26 cm. Jarabono, 8ŝ. 6p.

ABONU ĉe Brita Esperantista Asocio, aŭ U.E.A.

The British Esperantist

Publishers:
THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, INC.
140, Holland Park Ave.,
London, W.11

Editor:
(*Interim*)
J. W. LESLIE, F.B.E.A.

Contributions should be typewritten, in double spacing, and sent in by the 20th of the month previous to publication. The Editor reserves the right to refuse, correct, or shorten them. He is not necessarily in agreement with views expressed in signed articles, but accepts responsibility for those unsigned.

Advertisements: £3 per page and pro rata to one-eighth.

IN THIS ISSUE

	page
British Congress—43rd	68
Ekspozicio en Sutton	69
Esperanto kaj Radio	71
Kiu helpos ?	76
Local News	71
Malnova Testamento—La Esperanta Traduko de la	65
Membership Application Form	cover iii
New Books	73
Official Notices	76
Paĝo por Geknaboj	72
Small Announcements ..	cover iii
Translation Competition	75
Vokas la Junularo	70
Warsaw—Air Travel to	68

Agrablan surprizon vi havos kvin fojojn dum la jaro se vi abonas la revuon

NORDA PRISMO

la socia, kultura kaj literatura revuo.

Ĉefredaktoro: D-ro Ferenz Szilagyi.

Redakcia Komitato: B. Ragnarson, Islando; H. Rosbach, Norvegujo; V. Setälä, Finnlando; Poul Thorsen, Danlando.

Abonprezo: 2 Us. dol. aŭ 10.– Sv.kr., aŭ 14ŝ. 6p.

Abonu per nia Brita peranto:
The British Esperanto Association, Inc.,
140, Holland Park Avenue,
London, W.11.

Specimenon kontraŭ 2 internaciaj rpk.:
Norda Prismo,
Barnhusgatan 8,
Stockholm C, Svedujo.

WARSAW !
IMPORTANT NOTICE

At least 20 members needed to make up overland travel party to leave London 30th July; leave Warsaw 13th August. One and a half days travel each way.

Estimated cost £18 including visas and reservations.

Write **immediately** (and only) to:—

N. R. Smith,
75, South Ealing Road,
London, W.5.

Deposit £3, returnable if party cancelled. For further details send stamp to Mr. Smith.

The
British Esperantist

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

55TH YEAR, No. 646 MAY, 1959

La Esperanta Traduko de la Malnova Testamento

Ĉi tiu verkaĵo* ne estas granda laŭ paĝnombro, sed ĝi certe estas tre granda laŭ signifo kaj valoro. Ĝi havos apartan intereson por Esperantistoj, kiuj volas konstati la fidindecon de la Esperanta traduko de la Malnova Testamento. La aŭtoro elektis la 518 versojn aŭ frazojn, kies tradukon ĉiuj tradukantoj de la Biblio dum la jarcentoj trovis plej malfacila. Li komparis la Esperantan tradukon de ili kun la tradukoj en la lingvoj Angla, Franca, Germana, Hispana, Itala, Greka (Septuaginta), Nederlanda, Pola, Rusa kaj Latina (Vulgata). Tiam li turnis sin al la Hebrea originalo por ekscii pli precize, kial la tradukantoj diferencas inter si. Tiamaniere li ricevis klaran bildon de la kvalito de la Esperanta traduko; kaj li konkludis, ke la Esperantistaro rajtas esti plene kontenta pri ĝi.

La studo de ĉi tiuj 518 malfacilaj versoj kaj esprimoj montras, ke en multaj lokoj la ĝusta signifo de la Dia Parolo ne estas klara. Sed la aŭtoro akcentas, ke neniu doktrina punkto estas tuŝata sekve de tio.

En la "Enkonduko" la aŭtoro donas la historion de la Esperanta traduko de la M.T. Ĉi tiu historio estas detala kaj plene dokumentita—do certe fidinda. Tre rimarkindaj punktoj estas esprimitaj per la vortoj: "Eĉ la granda kontrol-laboro de la Biblia Komitato ne povas ion depreni de la aserto de Zamenhof mem, ke 'mi mem tradukis ĉion'; ĉar la kriterioj de ilia kontrolado estis tiagrade identaj kun liaj, ke oni povis priskribi la Komitaton kiel 'pli Zamenhofan ol Zamenhof mem'. . . . Do Zamenhof staras apud Lutero kiel unu, kiu sola tradukis la tutan Malnovan Testamenton; kaj tiun S-ro Warden prave nomis 'lia ĉefverko, krom la kreado de la lingvo mem'." Kiel diras la aŭtoro, per sia traduko de la M.T. Zamenhof ebligis al Esperanto eniri en la grandan familion de kulturaj lingvoj.

Post la Enkonduko sekvas kvin ĉapitroj, du adekvataj Indeksoj kaj Bibliografio. Ĉapitro I donas unue informon pri la antikvaj tradukoj de la Biblio—la Septuaginta (LXX), la Vulgata (L), la Peŝita (Siriaka), kaj la Gota. Mallonga paragrafo merite laŭdas la Hebrean kaj Aramean Vortaron de Gesenius (kun dato 1835). (Parenteze, la aŭtoro lasas la leganton kredi, ke tiu Vortaro estas la plej bona por la studanto. Tamen mi dubas pri tio. Vasta amaso da filologia materialo rilatanta al vortoj en la Biblio venis en la manojn de kleruloj post la lasta Angla reviziita eldono de la Gesenius-vortaro en 1898 (de Robinson), kaj aperis kelkaj novaj vortaroj, kiuj, bazante sin sur Gesenius, enkorpigis tiun novan materialon. Mi menciu, ekzemple, la Anglalingvan Leksikonon de Brown, Driver kaj Briggs (Oxford University Press, 1952), kaj la plej lastan "Lexicon in veteris testamenti libros" de

Köhler-Baumgartner (eldonita de E. J. Brill, Leiden, 1953, kun suplemento 1958) en la lingvoj Germana kaj Angla. Ĉi tiuj vortaroj ofte indikas nekonatajn al Gesenius nuancojn de Hebreaj vortoj. Tamen, ĉi tiu punkto estas neniel grava rilate la sekvantan enhavon de la ĉapitro, ĉar ŝajnas, ke Zamenhof ne uzis la Gesenius-vortaron.) La sekvanta enhavo de la ĉapitro donas komparojn inter la Esperanta kaj la antikvaj tradukoj de la M.T., kaj la aŭtoro laŭnecese aldonas interesajn kaj valorajn rimarkigojn. Li ja faras tion en ĉiuj ĉapitroj.

Ĉapitro 2 prezentas komparojn inter la Esperanta traduko kaj la tradukoj troveblaj en la menciitaj naciaj Biblioj. Ĉi tiu estas la plej longa kaj plej detala ĉapitro en la libro, kaj la aŭtoro montras al la leganto ĉiun eblan faceton de la komparado.

Ĉapitro 3 enlistigas 140 lokojn (el la 518 pritraktitaj en la libro), kie la Esperanta traduko diferencas de la Germana, Rusa, Franca kaj Pola, sed en kelkaj lokoj koincidas kun aliaj tradukoj. En la komparoj en ĉi tiu ĉapitro la aŭtoro konkludas, ke ne malofte la tradukoj de Zamenhof konsistigas veran interpreton de la malfacilaĵo.

Ĉapitro 4 havas la titolon "La Pozicio de la Esperantlingva Traduko", kaj ĝi montras, ke la Esperanta M.T. bone konformas al la kriterio, ke Biblia traduko kunmetu la ŝajne inter si kontraŭajn kvalitojn de sendependeco kaj de akordo kun la opinioj de la plej bonaj kritikistoj. En formo, kiel en substanco, ĝi meritas altan lokon inter la grandaj Biblioj de la mondo.

Ĉapitro 5 provas respondi al la demando, kiun parton havis la Biblia Komitato en la traduko? La unua frazo de la ĉapitro ligas sin kun la piednoto sur p. VIII, "Oni povas kontroli la laboron de la B.K. nur en la ok libroj endonitaj de Hachette, ĉar la manuskriptoj de la aliaj ŝajnas esti ne-alireblaj, unuj en Edinburga banko, aliaj ie en Parizo." Nu, estas vere, ke la aŭtoro devis ligi sin al la ok eldonitaj libroj; sed feliĉe ne estas vere, ke la aliaj manuskriptoj estas ne-alireblaj. Kiom mi scias, neniuj el la ne-eldonitaj manuskriptoj iam estis en Parizo. Kiam la Biblia Komitato finis sian laboron super ili—(parenteze, S-ro Wm. Bailey propramane skribis kopion de la tuta neeldonita manuskriptaro de Zamenhof, kaj mi havas ĝin)—S-ro Warden deponis la manuskriptojn en Edinburga Banko, kaj post lia morto (eble instige de F-ino Baird) la Edinburga Esperantista Societo fariĝis kuratoro de ili. Pro tio, ke la Brita kaj Alilanda Biblia Societo petis min kontroli la tekston de la Biblio vide al proponita rekompostado, mi petis al la Edinburga Societo pere de S-ro A. Coutts, ke ĝi dumtempe konfidu la manuskriptaron al mi por tiu kontrola laboro. La Societo afable konsentis. Je la momento do mi havas la manuskriptaron. Tuj kiam mi estos fininta la koncernan laboron, mi resendos la manuskriptaron al la Edinburga Societo, aŭ al iu alia loko laŭ la tiutempa deziro de la anoj.

Nu, kiel dirite, ne havante antaŭ si la Zamenhofan manuskriptaron, la aŭtoro devis respondi al la demando per la helpo nur de la ok jam eldonitaj libroj. El la 160 lokoj devenantaj el tiuj ok libroj—160 lokoj el la 518 koncernitaj—li trovis, ke la Biblia Komitato respondecas pri 34 (t.e. 20%). Li analizas ĉi tiujn, kaj komparas la 160 lokojn kun la respondaj lokoj en la naciaj Biblioj. Krom tio, li mencias diferencojn de detaloj en lokoj ne troviĝantaj inter la 518. Fine, por ĝuste taksi la laboron de la Biblia Komitato li prenis la libron "Eliro" kaj faris detalan komparon sub ok

rubrikoj inter la Hachette-a kaj la fina tradukoj. La konkludo estas, "Ankaŭ ĉi tiu ĉapitro sufiĉe klare montris, ke la Esperanta Malnova Testamento estas harmonia kunfandiĝo de la tradicia kaj la moderna interpreto. . . . Ambaŭ, Zamenhof kaj la Biblia Komitato, bone meritis de la Esperantistaro."

Mi devas rimarkigi ion pri n-ro 510, kie estas dirite, ke "la hebrea vorto povas signifi nur 'juna virino de edziniĝa aĝo'." Sendube ĝi povas havi tiun signifon, sed ne ekskluzive; fakte, en la 50 lokoj kie ĝi troviĝas en la M.T. ĝi signifas ĉiam (krom Lev. 21/14 kaj Jeĥ. 44/22, kie ĝi signifas "vidvino" kaj "edzino forsendita") "virgulino". Same ĝia derivaĵo "betulim" signifas "la aĝo aŭ stato de virgulineco. *Locus classicus* por la signifo de la du vortoj estas Read. 22/19-20. Juĝ. 11/37 tute ne havas sencon, se la vorto "betulêha" ne signifas "ŝian staton de virgulineco". La du vortaroj (Brown-Driver-Briggs kaj Köhler-Baulgartner) tute ne mencias la signifon "juna virino de edziniĝa aĝo". La Biblia hebrea lingvo evidente ne havis apartan vorton por "virgulineco"; ĝi ĉiam uzis "betulah" aŭ la kombinaĵon "na'arah betulah".

La teknika produkto de la libro estas modela—bona papero, klaraj presliteroj bonege presitaj. Bedaŭrinde, estis necese aldoni liston da korektendaĵoj, pri kiuj la aŭtoro konfesas, ke li mem kulpas, kaj li pardonpetas. Ili rilatas ĉefe al referencoj. Mi ne kontrolis ĉiujn referencojn, sed mi hazarde rimarkis du-tri aliajn korektendaĵojn. En la Rimarkigo ĉe 375 la transliterumo de la Hebreaj vortoj devus esti *ume'et* kaj (*gam*)-*'et* (ne *mat* kaj *at*).

La lingvaĵo estas ĝenerale neriproĉebla. Nur du-tri uzmanieroj ne plaĉis al mi. Ekzemple, (1) Antaŭ tri-kvar jaroj la Akademio avertis kontraŭ la *ĝenerala* verbigo de adjektivoj, ĉar -i ne = esti. Do la formoj *povas sami* (3/9), *samas kun* (11/13), *pravas* (21/6m), *malsamas* (40/9)—*diferenc-* estas verba radiko—estas evitendaj. (2) *Lasas sin kontroli* (43/4). La uzo de aktiva infinitivo post *lasi sin* anstataŭ la gramatike postulata pasiva estas idiotismo en kelkaj naciaj lingvoj, sed en Esperanto, en kiu devus manki idiotismoj, ĝi estas gramatika monstraĵo kaj absolute forigenda. (3) *Separas* (11/29), *separi* (41/1). Kial la neologisma formo *separas, separi*? *P.V.* donas nur la substantivon *separo* kun la speciala signifo "laŭleĝa izoligo de geedzoj". En ambaŭ cititaj lokoj la vorto *apartigi* estus taŭge uzebla. (4) *Foje* (39/29). Laŭ la tute ampleksa konkordanco de la Zamenhofaj verkaĵoj, kiun kompilis S-ro Wm. Bailey—kaj spite al tio, kion diras *P.V.* sub *fojo*—Zamenhof neniam uzis la formon *foje*. La radiko *foj-* baze komprenigas *ripeton*, do *foje* komprenigus *ripete*, kaj tiu signifo estas tro malpreciza en la kuntekstoj, kie oni uzus la radikon *foj-*. Zamenhof do ĉiam precizigis ĝin per prefikso, ekz. *iufoje, iafoje*. Estas notinde—ja notende !—en tiu sama rilato, ke Zamenhof neniam uzis la formon *kelkfoje* kun la senco de la Franca vorto *quelquefois*. *Iufoje* = *quelquefois*, kaj *kelkfoje* ĉiam signifas *en kelkaj apartaj okazoj, kelkajn fojojn*. (Ekz. *Li premis al sia amiko kelkfoje la manon*—Rabeno 43/28).

Nu, kun profunda konvinko mi diras, ke la aŭtoro per sia libro faris grandegan servon al ĉiuj, kiuj volas certe scii, kian valoron havas nia Esperanta traduko de la Malnova Testamento, kaj kiun lokon ĝi rajtas okupi inter la multaj aliaj tradukoj, antikvaj kaj la pli modernaj naciaj. Lia libro estas des pli valora kaj meritplena, ĉar ĝi estas science fakta, tute ne tendenca aŭ propagandeca. Ĝi ne estas libro por nura tralego, sed por

ofta studado, kaj la studanto trovos ĝin mino de interesaj multspecaj informoj. Mi sincere dankas la aŭtoron pro lia libro, kaj gratulas lin pri tia erudicia, grave signifa kaj unika verkaĵo. Mi esperas, ke multaj aĉetos ĝin, kaj mi estas certa, ke neniu aĉetinto domaĝos la koston.

W. J. Downes.

* *La Esperanta Traduko de la Malnova Testamento.* Dek-biblia konkordanco de 518 diskutindaj versoj. D. B. Gregor, M.A., L.B.E.A. XII plus 57 paĝoj, 14.5 × 20.5 cm. Broŝurita kun forta kovrilo. Propra eldono de la aŭtoro. En komisio ĉe Heroldo de Esperanto, Scheveningen. Prezo 4ŝ., afr. 4p.

AIR TRAVEL TO WARSAW

Lancastria Travel Service inform us that only seventeen members have booked for the air party. Others wishing to join the party should book with Lancastria as soon as possible. See their notices in previous issues of "*B.E.*"

43rd BRITISH ESPERANTO CONGRESS

New Congress Members

209. Miss D. M. Pick
210. Mrs. L. M. Tobin
211. Miss R. M. Spencer
212. N. R. Smith
213. Mrs. H. Smith
214. M. A. Smith
215. P. A. Smith
216. K. A. Sly
217. Mrs. K. A. Sly
218. M. Favell
219. Rev. A. L. Finbow
220. Mrs. A. L. Finbow
221. Miss M. W. Clarke
222. R. Fiedorovič
223. R. H. Osborne
224. N. Williams
225. Mrs. P. Hammerschlag
226. R. Murray
227. W. H. Coventry
228. Mrs. W. H. Coventry
229. Miss I. Coventry
230. Miss K. Coventry
231. K. R. C. Sturmer
232. N. Lock
233. Mrs. N. Lock
234. Miss E. Spiegl
235. A. D. Debenham
236. Miss D. Fribert
237. R. B. Wilkinson
238. Mrs. R. B. Wilkinson
239. C. M. Houghton
240. Mrs. C. M. Houghton
241. Lucio de Miranda
242. Dr. A. K. Beck
243. Mrs. A. K. Beck
244. J. C. Rapley
245. Mrs. J. C. Rapley
246. H. T. Gardner
247. J. M. Smith
248. Mrs. J. M. Smith
249. —. Smith (Jnr.)
250. —. Smith (Jnr.)
251. K. Dobrzalski
252. J. Beresforde
253. Miss A. M. Harris
254. Noel Wooding
255. Sydney Lancaster
256. Mrs. G. M. Keable
257. Kenneth J. Keable
258. Stanley E. Keable
259. Mrs. J. Shorter
260. Miss E. L. Parson
261. D. G. Hill
262. Miss L. S. Robertson
263. Miss E. E. Rothwell
264. Mrs. S. Krolenbaum
265. A. Mulligan
266. W. Hagon
267. Mrs. W. Hagon
268. Mrs. A. Halstead
269. H. A. Epton
270. E. R. Holt
271. Mrs. P. M. Holt
272. S. R. Hawkins
273. Miss J. C. Thorn
274. K. Alexander
275. Mrs. N. C. Alexander
276. Miss A. L. Gansler
277. Mrs. D. M. Hueting
278. Miss E. L. Wakes
279. D. B. Gregor
280. Mrs. D. B. Gregor
281. D. Broughton
282. L. G. Livett
283. Mrs. A. Livett
284. Miss G. Curran
285. Mrs. M. C. Hall
286. Miss J. H. Hall
287. Miss M. Smith
288. Miss E. Berry
289. S. Stronach
290. A. Thommerel
291. Mdm. A. Thommerel
292. Miss R. Phillips
293. Mrs. J. W. Langtree
294. J. Collins
295. Mrs. M. A. Collins
296. A. G. Plowman
297. J. T. Payne
298. Miss E. Woodget

EKSPOZICIO EN SUTTON

Kunlige kun la aranĝoj dum la Zamenhofa Jaro, kaj kun la permeso kaj helpo de la urba bibliotekestro, S-ro Stanley Dean, la Esperantista Klubo en Sutton (Britujo) starigis malgrandan ekspozicion en la centra biblioteko dum la periodo 4a ĝis 18a de Aprilo. Ĉiuj tri urbaj semajngazetoj raportis pri la ekspozicio.

La ekspozicio, kiu celis esti plie prestiĝa ol rekte propaganda, elmontris diversajn aplikojn de la lingvo sur la kultura kampo. Kvankam la bibliotekestro disponigis preskaŭ tutan sian montrospacon, tamen bedaŭrinde ne estis eble prezenti adekvate ĉiujn flankojn.

Sur longa anonctabulo en la vestiblo de la bibliotekodomo estis montrataj unuflanke dek kvin Esperantaj gazetoj kaj aliflanke granda mapo de Eŭropo, sur kiu estis ruĝinke substrekita la nomo de ĉiu urbo enhavanta U.E.A.-Delegiton. Oni starigis sur elmontra bretaro en la halo de la prunt-biblioteko dek ok verkojn de ĉiuj specoj, kiel malgrandskalan specimenon de la literaturo en Esperanto; antaŭ ĉiu libro staris karteto kun anglalingvaj klarigo kaj resumo. Sur altan anonctabulon oni alpinglis supre plurajn turismajn faldfoliojn kaj malsupre kovertojn el eksterlando kun esperantaj surskriboj. Ĉe la finoj de la librobretaroj estis fiksitaj la dek du fotogravuraj afiŝoj de Unesco pri la Deklaracio pri Homaj Rajtoj; sub ĉiu afiŝo estis aldonita paperslipo kun anglalingva traduko de la esperanta teksto. Samtempe la Klubo donacis por la pruntbiblioteko ses ekzemplerojn de modernaj lernolibroj por anglalingvanoj kaj unu ekzempleron de la Biblio en Esperanto.

Alec Venture
(U.E.A.-Delegito en Sutton)



Esperanto on Tape

600 ft. Twin track 3¾ l.p.s.

Introductory Course

35s. post free,
includes tape, 5 in. spool and
three small booklets

L. G. Hartridge,
64, Laurier Road, Addiscombe,
Croydon.

VOKAS LA JUNULARO

Rubriko de la Brita Esperantista Junularo

Karaj Geamikoj,

By now you should have received your second "Informilo". If the idea of a week-end meeting at a youth hostel interests you, just let me know. Be sure to write to me if you have not already done so, and ask me for a copy of the "Informilo" if you have not received one, or for details of this year's T.E.J.O.-Kunveno in Poland if you are interested.

Samideane via,

Humphrey R. Tonkin.

(7, Granny's Lane, Perranporth, Cornwall.)

KIU VOLAS ESTI JUNULARA DELEGITO?

La reto de delegitoj de U.E.A. estas institucio vere unika en la mondo. La delegitoj estas kvazaŭ konsuloj Esperantistaj, kiuj plenumas plej diversajn servojn: ili helpas geesperantistojn vojaĝantajn tra siaj regionoj; ili donas informojn al la esperantistaro pri siaj urboj, k.t.p.

Ĉiu membro de U.E.A. rajtas uzi la servojn de la delegitoj laŭ sia bezono, kaj dum multaj jaroj la aro da delegitoj, vicdelegitoj kaj fakdelegitoj donis helpon al miloj da geesperantistoj en la tuta mondo.

Je la nuna momento estas 2,500 delegitoj de U.E.A. en diversaj partoj de la mondo. Ĉi tiu nombro inkluzivas plurajn delegitojn de nova kategorio—junularajn delegitojn. La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, la junulara sekcio de U.E.A. organizas ĉi tiun novan reton. La tasko de la junularaj delegitoj estas: reprezenti T.E.J.O.-n en siaj lokoj, helpi al vojaĝantaj gejunuloj kaj kunlabore kun la centraj instancoj akceli la internaciajn korespondadon kaj ferio-interŝanĝadon de la junularo.

Jen la reguloj por fariĝi junulara delegito (JD):—

1. Ĉiu JD bone scipovu Esperanton.
2. JD devas esti membro-abonanto de U.E.A.
3. JD devas esti individua membro de U.E.A. jam unu jaron.
4. JD havu minimume 18 jarojn.

Kvankam troviĝas junularaj delegitoj en pluraj landoj, ne estas eĉ unu en Britujo. Ni ja bezonas minimume kelkajn kaj se vi havas sufiĉe konstantan adreson, kaj vi povas plenumi la suprajn regulojn, vi certe povus esti JD. Do skribu al B.E.A., ke vi volas esti JD. Tiel vi donos grandan helpon al nia movado kaj en Britujo kaj en la tuta mondo.

INTER ESPERANTAJ NEĜPILKOJ

Dum la pasinta vintro mi estis ĉe la 4a Skiferio de T.E.J.O. (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) en Filzmoos, Aŭstrujo. Mi estis la sola Anglo sed tie ne gravis ĉar preskaŭ ĉiu parolis Esperanton. Entute ni estis 30 partoprenantoj el 6 landoj:—Aŭstrujo, Germanujo, Italujo, Norvegujo, Usono, kaj mi el Anglujo. Dum la tagoj ni aŭ skiis aŭ grimpis inter la belegaj montoj. Mi sesfoje skiis kaj sesfoje devis ŝanĝi mian pantolonon pro malsekeco! Kiel ofte ni falis! Sed mirinde ni neniam dolorigis nin, kaj niaj penoj estis ja amuzaj—por la rigardantoj! Ni ofte festis, iom ebrie mi kredas, per la bongusta vino de Aŭstrujo. Ni ludis kaj dancis, kaj unu vesperon havis kompletan dancorkestron nomita "La Knaboj"; jes, eĉ la Rock-'n'-Roll disigis la trankvilon de la majestaj



Aŭstraj montoj, kiam la Esperantistoj invadis.

La gvidanto Heinrich Reiter, Wien, X, Sonnwendg. 32/11/33, Aŭstrujo, jam pensas pri aranĝoj por la venonta vintro.

Ĉu tio interesas vin ?

John Gobourne.

P.S.—La bildo montras min en mia kutima skipozicio, t.e. kuŝante ! En la malantaŭaĵo estas la vilaĝo Filzmoos.

ESPERANTO KAJ RADIO. La programoj en la Aprila *British Esperantist* ankoraŭ validas kun gravega aldono. Varsovio, Pollando, nun dissendas *ĉiutage* en Esperanto. Horo 15.30 G.M.T. sur mallongaj ondoj: 25.39, 30.98, 31.45, 31.50, 41.12, 42.11, 50.21; kaj meza ondo 249 m. Bone ricevataj en Hexham sur la mallongaj ondoj. Skribu al Pola Radio, Esperanto-dissendoj, Varsovio, Pollando.

J. Brownlee.

LOCAL NEWS

Bournemouth. Diservo okazas en Friends' Meeting House, Avenue Road, la unuan Dimanĉon en ĉiu monato je la 3.30 ptm. Tiu de la 7a de Junio gvidos S-ro A. J. Hicks.

Croydon. The Croydon Advertiser of 10th April printed an article on the value of Esperanto and called attention to the activities of the Young Esperantists' Club which meets every Tuesday at the Friends' Meeting House.

Huddersfield. "Kelkaj faktoj pri nia propaganda kampanjo: 1. Kvin el niaj anoj prelegis ĉe kunvenoj de 17 diversaj societoj dum la lastaj ses monatoj. 2. Ĉeestis tiujn 463 personoj. 3. En tiuj kunvenoj vendiĝis Esperantaj propagandiloj ĝis valoro de £3 9ŝ.

London. Diservo en Esperanto okazos en la Franca Protestanta Preĝejo, Soho Square, W.1, je 3.15 ptm., la 14a de Junio, kiam S-ro H. B. Smith el Dagenham kondukos.

Manchester and District Esperanto Societo. La Aŭtuna Zamenhofa Ekspozicio de Esperanto okazos de la 7a ĝis la 26a de Septembro en la Centra Biblioteko de Manĉestro. S-ro R. J. Harrison, 84, Humphrey Lane, Urmston, Manchester danke ricevos donacojn por tio.

WHAT IS THIS STRANGE FORCE ?

–the thinking mind?

You begin to LIVE when you learn to heed this inner mind, awakening your natural thought forces. For centuries the Rosicrucians have collected and guarded basic facts on successful living; truth's which guide one's path through life. For free booklet, explaining how to acquire this knowledge, write Scribe H.T.G.

THE ROSICRUCIANS (AMORC)
25, Garrick Street, London, W.C.2, Eng.

PAĜO POR GEKNABOJ

Contributions to this page will be welcomed by W. J. Nesbitt, 4, Clarence Villas, Bishop Auckland, Co. Durham.

This month we begin with an article on Jazz; next comes a strange story about a dog with brown boots, and we end with a most interesting story of a meeting on a railway train.

Ĵazmuziko. La nigraj sklavoj, ekspeditaj al Ameriko kaj laborigitaj en la kotonkampoj, eligis siajn sentojn, dum ili laboris, per malĝojaj kantoj. El ĉi tiuj kantoj, el iliaj popoldancoj kaj religiaj kantoj naskiĝis ĵazo.

Post la forigo de sklaveco la stato de la negroj malrapide pliboniĝis, kaj pli facile ili povis kunveni por fari muzikon per siaj malmultekostaj kaj memfaritaj instrumentoj. Ili formis muzikistarojn kiuj ludis en trinkejoj en la negraj kvartaloj. La muziko fariĝis pli vigla kaj disvastiĝis al aliaj urboj kaj al la norda parto de Usono, kie ofte la negroj ludis en la klubejoj de blankuloj. Post la unua mondmilito ilia muziko aŭdiĝis en Britujo, kie ĝi nun interesas al multaj.

Nuntempe ekzistas tri ĉefaj ĵazstiloj: la tradicia, kiu kopias la stilon trovitan en New Orleans; la ĉef-flua, kiu estas la komercigita stilo de Chicago; kaj la moderna, kiu estas malpli formala kaj pli varia kaj libera. Sed je iu stilo la ĵazo estas vera artformo kiu meritas justajn aŭskulton kaj juĝon.

el la Angla de *David Rae* (11),
Darlington.

Hundo kun brunaj botoj. Antaŭ kelkaj tagoj mi staris en trinkejo, kiam envenis viro kun hundo. La viro aspektis ordinare, sed sur la piedoj de la hundo estis brunaj botoj. Mi tre scivolis pri ĉi tiuj botoj; do, post iom da hezito, mi turnis min al la viro kaj demandis, "Kial via hundo portas tiujn brunajn botojn ?"

La viro rigardis min surprizite. "Kompreneble, ĝi portas siajn brunajn botojn pro tio, ke la nigraj botoj nun estas ĉe la riparisto."

el la Angla de
M. E. R. Watson (13),
Darlington.

Interesa sperto. En 1903 survoje de Bukureŝto al la maro, mi trovis kunvojaĝanton, kiu penis komprenigi sin al kelnero. La kelnero parolis Rumane, Serbe, Turke, Bulgare kaj Ruse, sed ne komprenis lin. Mi aliris kaj demandis Germane, France, Angle, Itale, Hungare, Hispane kaj Greke, ĉu mi povas helpi. Sed vane ! La fremdulo komprenis neniun el la dek du lingvoj. Fine mi memoris, ke mi ĵus legis gazetan artikolon pri Esperanto, kaj mi demandis, "Ĉu vi parolas Esperante?" Krio de ĝojo: "Jes, mi parolas !" Kaj li daŭrigis per tiu lingvo, kiun bedaŭrinde mi mem ne sciis. La fremdulo, vidante tion, enmanigis al mi kelkpaĝan Esperantan gramatikon, kiun mi tralegis. Post dek horoj, renkontinte nin denove, ni povis jam sufiĉe bone interkompreni per Esperanto. Tiam mi trovis, ke mia nova amiko estas Svedo, kiu parolas Svede, Norvege, Dane, kaj Finlande. Ni tri, do, posedante inter ni dek ses lingvojn, sen Esperanto ne povis interparoli. De tiam mi estas Esperantisto.—

Henriko Fischer, Galatz.

el "Step by Step in Esperanto"
(*M. C. Butler*)

[Verkoj de eksterlandaj geknaboj estas aparte bonvenaj.]



NEW BOOKS

Order starred books from the B.E.A., others from the addresses given

Verkojn recenzotajn oni bonvolu sendi po du ekzempleroj al la Sekretario, B.E.A., 140, Holland Park Avenue, London, W.11: nepre samtempe indiku la prezon kaj la afrankon

***Taglibro de Anne Frank** (**La Postdomo**). 12 Junio 1942–1944. El la Nederlanda originalo tradukis G. J. Degenkamp. Eldonita de Heroldo de Esperanto, Scheveningen. 216 p., bind. Prezo 15ŝ., afr. 1ŝ.

La Taglibro de Anne Frank estas unika, ĉar, malgraŭ la fakto ke la verkistino estis dektrijara knabino, ĝi vere valoris esti eldonita kaj tradukita. Anne Frank estis inteligenta junulino, sed estas ŝiaj tute apartaj spertoj kiuj igas la libron elstara.

Ŝi estis la plej juna filino de juda familio kiu forlasis Germanujon por rifuĝi en Nederlando ĵus antaŭ la dua mondmilito. Ŝi komencis skribi sian taglibron en 1942 kiam ŝi fariĝis dektrijara, ĉar, kvankam ŝi havis multajn amikinojn kaj adorantojn, ŝi ne havis konfidantinon. Do, ŝi konfidis ĉion al la taglibro kiun ŝi nomis "Kara Kitty".

Iom post la kapitulaco de Nederlando komencis por ŝi vere terura sperto. Anstataŭ obei vokon de la S.S., ŝia patro iris al kaŝloĝejo kune kun sia edzino kaj siaj du filinoj Margot kaj Anne. Baldaŭ alia juda familio kun dekokjara filo venis rifuĝi en la sama domo kaj poste oni invitis maljunan dentiston loĝi kun ili; do, ok personoj en kvar malgrandaj ĉambroj malantaŭ magazeno kaj kontoroj. Anne skribis, "Neesprimeble sufoke premas min, ke ni estas devigitaj neniam eliri." En tiaj cirkonstancoj ne estas surprize, ke disputoj kaj argumentoj okazis kaj S-ino Van Daan "disputis kiel dika, kolere ruĝa fiŝvendistino".

Amikino alportis nutraĵon al la kaŝloĝantoj kaj kompense la du knabinoj faris kontorlaboron por ŝi. "Kuponoj por nutraĵoj estis kaŝe aĉeteblaj, sed ilia prezo konstante kreskis".

La libro ne estas sen bonhumoro. Kiam Peter portis supren ses sakojn da legumenoj, la sesa sako "disŝiriĝis kaj pluvo, pli ĝuste hajlo, da brunaj fazeoloj ĵetiĝis tra la aero sur la ŝtuparon. La bruego estis surdiga. Momenton Peter teruriĝis sed vidinte min (Anne) malsupre staranta kvazaŭ insuleto inter ondoj da fazeoloj li eksplodis en laŭta ridego."

La stilo de la Esperanta traduko estas bona kaj la tuta libro estas altvalora historia dokumento pri la vivo de Judoj en Nederlando dum la dua mondmilito.

O. Rowbotham.

Magyar-Eszperanto Szotar (Hungara-Esperanta Vortaro). 544 p., bind. **Eszperanto-Magyar Szotar** (Esperanta-Hungara Vortaro). 448 p., bind. Eldonejo: Redaktoro de Esperanto-Vortaro, Budapest V, Alkotmany utca 21, Hungarujo.

Ĉi tiuj vortaroj aperas en la serio de poŝvortaroj "Terra", kaj verŝajne konformiĝas al ties formato kaj amplekso. Tamen la vortrikolto estas riĉa kaj sendube ili estas tre valoraj por niaj Hungaraj samideanoj. La kompilintoj konfesas sian ŝuldon al la verko de G. Waringhien *Grand Dictionnaire Esperanto-Francais*, kiun ili povis plene utiligi ĉe la volumo Hungara-Esperanta. Neologismojn oni montras per asterisko.

Il Latino—Lingua Internazionale? de C. Agostini kaj P. Marelli. Mendebla ĉe Itala Scienca Klubo Esperantista, Piazza Napoli, 40, Milano. 31 p., broŝ. Prezo 200 liroj aŭ 4 rpk. (In Italian.)

Jen la definitiva vorto pri la demando, ĉu Latino povus esti la I.L. Montrinte, kiel dum longaj jarcentoj Latino rifuzis morti kaj eĉ nun inter siaj adeptoj trovas kelkajn, kiuj nostalgie revas ĝian releviĝon, la du aŭtoroj skizas diversajn provojn aŭ uzi neŝanĝitan Latinon en moderna (teknika) kunteksto, aŭ krei artefaritan lingvon sur ĝia bazo. El tio rezultas klare ĝia netaŭgeco por tiu rolo. La solvo povas esti nur Esperanto, kies kvalitojn Descartes jam en 1629 preskribis kiel esencajn al I.L. Samtempe tamen kun ĉi tiu konstato venas la konsola ekscio, ke Esperanto mem, dank' al siaj latindevenaj ingrediencoj, estas iagrade Latino revivinta.

Je la fino venas bonega latina letero, en kiu unu el la aŭtoroj, kvankam aŭ eble Latin-amanto (kiu eĉ provis eduki du denaskajn Latinistetojn), rezignas pri Latino kiel internacia lingvo kaj pledas por Esperanto: "Nullus jam invenitur tam longinquus terrarum locus, ubi non aliquis esperantista sit." La verketo do povas bone atingi sian duan celon—altiri la atenton de klasikistaj medioj al Esperanto, kaj diskutigi ilin pri ĝi kun kompreno kaj respekto. Laŭdinda celo, ankaŭ por ni.

D. B. Gregor.

Almanaketo. Eldonis Esperanto-rondeto ĉe Kleriga Domo, Martin, Ĉeĥoslovakujo. 68 p., multobligita. Prezo ne indikita.

Ĉi tiu libreto enhavas literaturajn pecojn originalajn kaj tradukitajn. La kontribuintoj estas Slovakaj Esperantistoj kaj la eldonaĵo estas literatura aldono al la cirkulero, "Esperanto en Slovakio". Inter aliaj troviĝas la nomoj de J. V. Dolinsky kaj Miloŝ Lukaŝ.

***Mikspoto.** Eldonita de Serbia Esperantista Ligo, Beograd, Jugoslavujo. Prezo 9ŝ. 3p., afr. 9p.

Ĉi tiu libro konsistas el la unuaj kvin broŝuroj en la serio "Nova Libro" kune binditaj. Jen la titoloj (citaĵoj estas el recenzoj aperintaj en "*B.E.*"):—

Provinca Gastejo (Originala novelo). "Por pluraj legantoj eĥo de jam legita novelo, tamen la verkinto ĝin bone rakontas."

Du Noveloj. "La verkinto delikate rakontas."

Analfabeto kaj Butono (traduko). "Du amuzaj unuaktaj komedietoj ne postulas multe da roluloj."

Suspektinda Persono (traduko). "Duakta komedio . . . agado okazas en la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento."

Rakontoj el la Naciliberiga Batalo de Jugoslaviaj Popoloj. "Prezentas malgajigan legaĵon, tamen estas konsilinde . . . legi."

La bindita volumo estas aparte taŭga por grupaj bibliotekoj.

Valtatie Kielitaitoon (Privilegia Vojo al Lingvoscio: Esperanto) de Vilho Setälä. Eldonita de Fondumo Esperanto, Helsinki. 124 p. broŝ. Prezo ne indikita.

Ĉi tiu bonega rektmetoda lernolibro havas nur la titolon kaj du paĝojn de enkonduko en la Finna lingvo. Post tio la lerte elpensita teksto estas tute en Esperanto kaj la libro estas ĉiel rekomendinda al lernantoj kaj progresantoj (kaj al ties instruantoj), kiuj povas toleri home agantajn bestojn kiel ĉefrolulojn. La presliteroj kaj desegnoj plaĉas al la okuloj, kaj la kovrilo estas kolore presita.

La Phu-Loi Masbuĉado en Sudvietnamio. La Fremdlingva eldonofico, 189 Ba Triêu, Hanoi, Vietnamio. 16 p., broŝ. Prezo ne indikita.

La titolo estas indiko pri la enhavo.

TRANSLATION COMPETITION

Result of Test Piece No. 18

A Linguistic Ratio

Mauritius is a small island 720 square miles in area lying a little more than 500 miles off the east coast of the big French island of Madagascar. From 1507 to 1810 it was successively occupied by the Portuguese, the Dutch and the French until its capture by the British in 1810.

Within this small area the descendants of people from Europe, Africa, India and China—600,000 in all—rub shoulders together. On the linguistic fresco of Mauritius at the beginning of the 19th century the unavoidable tower of Babel stood out sharp and clear, but today it has been completely rubbed away by the emergency of a patois called "Creole". "Creole" is mainly corrupt French with just a little dash of Hindi, Malagasy, and English, and could be compared to pidgin English. Though providing the leitmotif for this potpourri of languages, "Creole" has the disadvantage of not possessing a written grammar and a standard spelling. But it has the incomparable advantage of being understood by every single inhabitant of the island, regardless of his racial origin.

Is it too much to hope that what "Creole" is to Mauritius, Esperanto will be to the world?

Lingva Proporcio

Maŭricio, malgranda insulo kun areo de 1,865 kvadrataj kilometroj, troviĝas iom pli ol 800 kilometrojn oriente de la granda Franca insulo Madagaskaro. De la jaro 1507 ĝin okupis sinsekve la Portugaloj, la Nederlandanoj kaj la Francoj ĝis la Britoj ĝin prenis en 1810.

Interne de ĉi tiu malvasta terspaco la posteuloj de homoj el Eŭropo, Afriko, Hindujo kaj Ĉinujo—entute 600,000—vivas en proksima rilato. Sur la lingva fresko de Maŭricio komence de la dek-naŭa jarcento la neevitebla turo de Babel sin distingis nete kaj klare, sed hodiaŭ ĝin tute forfrotis la estiĝo de loka lingvo nomita "Creole". "Creole" estas plejparte malpura Franca kun iomete da *Hindi* (lingvo el Hindujo), Madagaskara kaj Angla lingvoj, kaj estas komparebla kun piĝino. Kvankam "Creole" provizas la desegnon por ĉi tiu miksaĵo de lingvoj, ĝi tamen havas la malavantaĝon, ke ĝi posedas nek skribitan gramatikon, nek norman literumadon. Sed ĝi havas la senkomparan avantaĝon, ke ĝin komprenas ĉiu insulano, kiu ajn estu lia rasdeveno.

Ĉu estas troa la espero ke tio, kio "Creole" estas por Maŭricio, Esperanto estos por la mondo?

This interesting piece written by our member in Mauritius, Mr. G. B. Cathan, presented a few difficulties to the translator. For instance, what idea did the author wish to convey by the word *leitmotif*? Solutions offered included *bazo, gviddesegno, gvidfadeno, komprenigilo, unuiga faktoro.* Only one competitor, Mr. B. Bishop, gave measurements in the metric system, which we preferred, since an Esperanto text is presumably intended for an international readership. The area given above, however, is taken from a modern encyclopedia.

The above text is a "mosaic" culled from the best entries. We award the prize to Mr. T. E. Cottam (Sunderland) with honourable mention to R. Bland (Nelson), E. Lefebure (Enfield) and A. Rickwood (Hastings).

C. D. A. Capp.

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, Inc.

OFFICIAL NOTICES

Hon. President: B. Long, B.A.

President: Mrs. F. W. White, F.B.E.A.

Hon. Secretary: W. A. Gething, O.B.E., B.Sc. **Hon. Treasurer:** R. B. Wilkinson

Hon. Education Secretary: M. C. Butler, M.R.S.T.

Secretary: J. W. Leslie, F.B.E.A.

Registered Office: 140, Holland Park Avenue, London, W.11. *Tel.:* PARk 7821

Hours: Weekdays 9 a.m. to 5 p.m. (closed 1–2 p.m.). Saturdays 9 a.m. to 12 noon

NEW JUNIOR MEMBERS

Beckford, C. S.	*Caterham*
Faulds, B. L.	*Maybole, Ayrshire*
Gardiner, F-ino G.	*Darwen*

NEW MEMBERS

Gardiner, Mrs. N.	*Darwen*
Gwilt, W. E. L.	*B.F.P.O. 34*
Kyle, Dr. D.	*Northwood, Mddx.*
Lomas, G. V.	*Leeds, 8*
Norrie, Miss M.	*Bristol, 8*
Paulden, J.	*Bolton*
Rossetti, R.	*Bristol, 8*
Waring, Mrs. M. G.	*Bexleyheath, Kent*
Watts, W. A.	*London, S.W.19*

DONATIONS TO GENERAL FUNDS

Previously acknowledged: £121 11s. 2d.
4s. 6d.: "White" fudge.
5s.: A. Hill, L. H. May, Mrs. J. S. Ryan.
5d. 6d.: R. England.
7s. 6d.: Miss J. D. Bald, R. Miller.
10s.: H. Tan.
14s.: H. F. Ashworth.
20s.: T. C. L. Hickson.
£1 3s. 6d.: Taunton School.
£5: "Back Slider".

Total to 20th April, 1959: £131 18s. 8d.

DONATIONS TO ADVERTISING FUND

Previously acknowledged: £24 2s. 5d.
10s.: Miss M. H. Tucker.
24s.: Miss A. Solar.

Total to 20th April, 1959: £25 16s. 5d.

DONATIONS TO "B.E." SUPPORT FUND

Previously acknowledged: £25 16s. 8d.
Under 2s. 6d.: 2s.
5s.: Mrs. L. Wiltshire.
6s.: R. Rossetti.

Total to 20th April, 1959: £26 9s. 8d.

B.E.A. EXAMINATION RESULT

Advanced Examination

Oral Part

*Collins, S-ino M. *Reading*

* *Denotes a candidate who, having passed both the Oral Part and the Written Part of the Advanced Examination, has been awarded the Advanced Diploma.*

Subscriptions to other magazines. It should be noted that the responsibility of B.E.A. ends with transference of subscriptions. Complaints about non-receipt of magazines should be addressed direct to them by subscribers, *not to B.E.A.*

J. W. Leslie, Secretary.

KIU HELPOS ?

Ĉi-sube estas elĉerpaĵo de letero, kiun mi estas ricevinta de samideano kiu gastigis min dum mia vojaĝo al Moskvo la lastan someron:

"Koncerne vian demandon kiel B.E.A. povus helpi nian movadon—per sendado de tralegitaj, nebezonaj gazetoj ! Se de tempo al tempo venus pakaĵo mi havus ian legaĵon por la membroj de nia loka societo. Ankaŭ *The British Esperantist* k.s. estus tre konvenaj."

Mi mem estas jam farinta mian eblon sed ĝi certe ne estis sufiĉe granda. Se estas aliaj samideanoj kiuj ŝatus helpi mi petas ilin sendi pakaĵon rekte al: S-ro Jan Poplawski, Lukaszewicza 5,m.6, Poznan, Pollando.

Fred Willan.

SMALL ANNOUNCEMENTS

2d. per word. Minimum 2s. per issue. Prepaid

Copy must be received at the B.E.A. Office by the 20th of the month

Kaj kun granda potenco la apostoloj atestis pri la releviĝo de la Sinjoro Jesuo; kaj granda graco estis sur ĉiuj.
La Agoj 4. 33.

U.S.S.R., Moskvo. Post Box 996. Volochov Anatolo deziras korespondi pri scienco, literaturo kaj vivkutimoj.

Bonvole notu la jenan adresŝanĝon. Norman kaj Helga Smith (20 Whalley Avenue, Davyhulme, Manchester, Anglujo) loĝas ĉe 75, South Ealing Road, South Ealing, London, W.5, ek de la 1-a de Aprilo.

Mi tedas miajn geamikojn per adresŝanĝo. R. Rossetti, 23, Victoria Square, Bristol, 8, Anglujo.

The Workers' Esperanto Movement associates world friendship with trade union, co-operative and socialist principles. Details and magazine sent free: 27, Argyle Road, Ilford, Essex.

La Kvakera Esperantisto, kvaronjare, 5ŝ. minimume ĉiujare. Specimeno 1ŝ. Sek.: Sydney Lodge, Bath Road, Ventnor, I.O.W.

Brita Esperanto-Humanistaro bonvenigas ĉiujn humanistojn en sian membraron. Filiiĝinta al "Ethical Union" kaj al B.E.A. Sendu minimume 7ŝ. 6p. kiel kotizon al Sek.-Kasisto, G. L. Dickinson, 21, Gribble Road, Liverpool, 10.

Socialist Leader, 48, Dundas Street, Glasgow, C.1. Single copies 3d.: 12 weeks 4s. : 24 weeks 8s. : 52 weeks 15s. 6d. Complete *Esperanto* article in every issue.

Humanistoj, liberpensuloj, ateistoj, k.s., kiuj ĉeestos la S.A.T.-Kongreson en Dortmund kaj emos partopreni Liberpensulan kunvenon, bonvole enrilatiĝu kun S-ro E. Weichmann, Dortmund-Kirchderne, Lotenkamp, 4, Germanujo.

ZAMENHOF CENTENARY YEAR, 1959
IS RECRUITING YEAR

Bring in your friends and relations

THE British Esperanto Association consists of men and women who believe that Esperanto is one of the important factors of modern progress; that by its aid international communication of every type is facilitated. Esperanto is intended not to replace the national tongues but, acting as a second language for people of all nations, to facilitate both written and spoken communications between them. **YOU** are invited to co-operate in spreading a knowledge of Esperanto by completing the following application for membership :—

SUBSCRIPTION : 20/- per annum. Persons joining after 1st July may pay 10s. to end of current year—those under 21 may join as Junior Members at half rates.

TO THE SECRETARY, THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INC.),
140, HOLLAND PARK AVENUE, LONDON, W.11.

I, ...

hereby apply for membership of THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Inc.) and enclose the first

Subscription of .....

Signature .....

Nationality ..... *Rank, Profession or Occupation* .....

Address .....

.....

Date ..... *Age (if under 21)* .....

Jes, sur 648 paĝoj, estas pli ol 350 poemoj de 90 poetoj el 35 landoj el ĉiuj kontinentoj, en 70-jara kavalkado.

Kaj eĉ kun bildoj. . . .

Unika, demonstracia verko!

Al multaj senpacience atendintaj ni diras: *Jen, karaj, kion vi sopiras!*

Al ĉiuj aliaj ni diras: *Jen . . . la Esperanta Antologio!*

Elektu, ĉu vi deziras volumon broŝuritan aŭ tole binditan.

En ambaŭ specoj la prezo, por tia vasta verko, estas mirinde modera.

Al saĝulo sufiĉas aludo. . . .

ESPERANTA ANTOLOGIO

poemoj 1887-1957

redaktis WILLIAM AULD

Prezo: broŝurita ekz. 3,60 tolbindita 4,20 us. dol. aŭ egalvaloro, plus sendkostoj.

Mendu ĝin de *B.E.A.*, de la eldonisto *J. Régulo* kaj de ĉiuj libro-servoj de la Movado.

KUNHELPU PLUPORTI LA TORĈON!

Printed by SUMFIELD & DAY LTD., Station Street, Eastbourne, for the Publishers, THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, INC., 140, Holland Park Avenue, London, W.11